

Rio Esperantista

Oficiala Organo de Asocio Esperantista de Rio de Janeiro

PENSO KAJ LABORO POR LA UNIVERSALA FRATECO

DIREKTORO: DELIO PEREIRA DE SOUZA

ĈEFREDAKTORO: LASZLO ZINNER

JARABONO

BRAZILIO — Cr\$ 20,00
Eksterlande — U\$ 1,50
Aŭ 15 Respondokuponoj
Ekzemplero — Cr\$ 2,00

RIO DE JANEIRO, JUNIO, 1948

JARO 11

Monata eldono

N.º 15

Adreso: Caixa Postal 3677

Redakcio kaj Administrejo
Rua das Marrecas, 19, 2.º and
Telefona 22-5300

O ESPERANTO EM BAURÚ



Flagrante tirado no momento em que o nosso correspondente, Sr. Luiz Bartholomeu, saudava o G.E.B. pela efeméride.

BAURU' — (Do nosso correspondente). — Com uma brilhante sessão solene, comemorou em 27 de Maio o seu 2.º aniversário de fundação, o Grupo Esperantista de Baurú. Presidiu a solenidade o Sr. Homero Escobar, Presidente Honorário do G.E.B., o qual pronunciou brilhante discurso, enaltecendo o valor do ESPERANTO como língua internacional auxiliar. Ouviu-se, a seguir, a palavra dos gesamideanoj Anélio Mostério, Presidente da Diretoria do G.E.B.; Luiz Bartholomeu, correspondente do RIO ESPERANTISTA em Baurú; Nair Escaraboto; Norma Escaraboto; Odete Onofriolo; Elza Leão; Jacob Duarte; e Nabor da Graça Leite, Vice-Presidente da Diretoria do G.E.B.

Além de Esperantistas e pessoas de destaque da sociedade Bauruense, pudemos observar a presença do Sr. Dr. Helio Lemos Lopes, DD, Presidente do Centro Cultural de Baurú.


São do nosso correspondente as seguintes palavras, pronunciadas na memorável so-

lenidade comemorativa, referindo-se a um apêlo do Sr. Presidente da Associação Americana para o progresso da Ciência:

“Como poderemos nós, auxiliar de um modo rápido e eficiente estas correntes de boa vontade, através os múltiplos países do mundo, se desconhecemos seus idiomas, se não nos compreendemos?

Só adotando uma língua internacional neutra, que sirva para a compreensão dos povos, poderemos auxiliar o pensamento de colaboração do Sr. Presidente da Associação Americana para o Progresso da Ciência, correspondendo-nos com todos os povos do mundo, trocando idéias, fazendo um intenso intercâmbio cultural, estaremos colaborando nesta campanha de boa vontade, pela paz mundial contra as guerras sangüinolentas que enlutam tantos e tantos lares.

Que língua deveremos então adotar? — Perguntareis. E eu vos responderei: o ESPERANTO, que é a língua auxiliar internacional e neutra”.



Grupo tirado após a solenidade, vendo-se membros da Diretoria do G.E.B. e alguns alunos dos cursos de Esperanto, mantidos pelo G.E.B.

LA GAUCO

Verkis Vicente Fidel Lopez.

La argentina gauĉo vivis sole kaj sendepende en aparta kaj libera individuismo. Li emancipiĝis je siaj gepatroj tuj kiam li eksentis la unuajn fortojn de la juneco; kaj li sin nutradis abunde per la bestoj kiujn Dio kreis ĉe la dezerto. Armita per la maŝo, li povis kapti la unuan ĉevalidon kiu estis pli taŭga al li; por sin subteni li elektis laŭ sia propra plaĉo la plej grasan bovinon kaj se li bezonis iom da mono por havigi al si kelkajn el la komercaj objektoj kiujn li deziris, li faligis tiom da taŭroj, kiom li volis, senfeligis ilin kaj ilin vendis en la apudbordaj vilaĝoj al la marĉanduloj kiuj negocis per ili por provizi la malabundegan komercon kiun ni havis kun Eŭropo.

La civila aŭ politika leĝo ne regis lin kaj, kvankam li ne estis ĉesinta esti membro de civilizita societo, li vivis sen submeto al la leĝoj de ties membraro. Li konstruis sian kabanon ĉe angulo de rivereto, ĉar la provosoj de la Fratara kutimis havi la ideon transiri la kamparojn kun 50 aŭ 60 policanoj pendigante rapide la banditojn, la gauĉo zorgis starigi sian kabanon kasiĉa en la arbaro, ĉe la vadoj aŭ vojoj kiuj estis konataj nur de li, por eviti ke oni renkontu lin nepripaŝita; ĉar la reĝa justeco ne havis grandan zorgon distingi la senkulpulojn inter la vagulojn, nek li mem bone sciis inter kiuj li devis sin klasifiki.

Al ĉiuj tiuj trajtoj, naturaj en ilia vivsistemo, la gauĉoj aldo-

nis kvalitojn de forta, nervema kaj malkvieta temperamento. La klimato en kiu ili vivis permesis al ili vojaĝi en malbona vetero, freŝa aero, en la kondiĉoj moderaj kelkfoje, malmildaj aliffoje, ĉe la naturo kaj tra la spaco. Alkutimigintaj al la danĝero kaj ribelemaj, ili estis, unuvorte, ĉiam pretaj kontraŭbatali la senditojn de la reĝa justeco kiam ĉi lastaj estis renkonteblaj.

La argentina gauĉo konsideris kiel estro kaj servis milite kiel subulo nur al tiu, kiun li mem elektis laŭ sia propra inklino, ĉar antaŭ ĉio li sin sentis libera homo kaj kiel tia li uzis siajn kriterion kaj individuecon, tute sendepende de iu ajn influo.

Nu, jes, kiam li estis decidiĝinta pri politika partio, lia aliĝo estis senlima kaj oni povis ĝin konsideri dumvive; li ŝparis nenan oferon kaj lia konstanteco, precipe en la politikaj bataloj, atingis eĉ heroecon. Li elektis politikan partion laŭ sia propra sento kaj pro pasio, neniam pro intereso nek je la intenco gajni eĉ la plej malgrandan rektan profiton kiel premio al siaj pezoj. Lin gvidis sole tio, kio estis analogio de la kutimoj kaj tendencoj inter lia animo kaj tiu de la estroj al kiuj li servis; tio estis, laŭ lia maniero, patriotismo kiu finfine estiĝis politika kaj morala sento ekposedinte al si apartajn kaj liberajn kaŭzojn de lia propra volo.

Esperantigis E. Garrote.

S A M I D E A N O J !

Abonu RIO ESPERANTISTA-n por viaj eksterlandaj gekorespondantoj, kaj proponu al ili aboni alilandajn gazetojn kaj revuojn por vi. Tiamaniere vi multe helpos la movadon.

Ses jarojn jam forpasis, kaj la Asocio komencas vivadi la sepan jaron. Kion ĝi portos al ni? Certe la samon, kiel la antaŭaj: multe da laboro kaj malmulte da sukcesoj. Tamen tio, kio estas la plej grava, estas la sperto, kiun ni akiras pere de la laboro por la Asocio, kaj ĉefe por la E-movado. En nia laborado, ni metu ĉiam la verdan standardon tre alte, kaj sindone kaj entuziasme ni helpu antaŭenigon de la sankta afero de nia glora Majstro — Zamenhof.

(Fina parto de la parolado farita de la prezidanto de la Asocio je la 30-3-1948, okaze de ĝia 6^a jardatreveno).

La Loganto de la Subteretago

Psikologia paroladeto de D-ro Efraimo Rizzo, Direktoro de Kultura Departemento de la Kristana Asocio de Junuloj (YMCA), en Rio de Janeiro, Brazilo.

La homa psikologio estas komparebla al trietaĝa domo enloĝata de samfamilianoj. Laŭkutime, ili ne ĉiam amike interrilatas...

Supre, en la tria etaĝo, loĝas S-ro Konscio kune kun siaj gefiloj, kiuj nomiĝas: la knaboj, Flaro, Gusto kaj Palpo, la knabinoj, Vido kaj Aŭdo. La duonfilon, kiu estas tre silentema, oni nomas Sesasentumo.

Escepte de la lasta, ĉiuj laboras, ĉiam okupataj je intensa kaj senhalta agado. La patro ĉiam maltrankviligas pri siaj gefiloj: ili treege lin maltrankviligas. Multe da laboro kaj da atento ili postulas de li!

En la dua etaĝo loĝas S-ino Subkonscio kiu jam partoprenis la familian rondon loĝanta en la supre etaĝo. Poste, ŝi malsupreniris kaj nun loĝas kun sia filino, F-ino Memoro, kiu, memvolema, pro tio ke ŝi jam estas plenaĝa, faras kion, kiel kaj kiam ŝi volas... Tamen ŝi estas la sola virino ĝis nun konata kiu kapablas gardi sekretojn. Komprenoble ŝi estas vera aberacio virina!

La loĝantoj de la supre etaĝo al ŝi petas la helpon ĉiufloje, kiam ili forgesas tion, pri kio ili devus memori.

La unua etaĝo de la domo estas okupata de familio tre pridiskutita kaj mistera. Freud ja eltrovis, ke la domestro estas S-ro Nekonscio. Verŝajne la domestrino nomiĝas Heredeĉo kaj

la knaboj Instinkto kaj Atavismo. Tiuj kvar najbaroj ne estas tre estimataj, ĉar ili ĉiam malkaŝas la intiman vivmanieron de la loĝantoj de la dua kaj la tria etaĝoj, du onfrenezigante ilin, estigante inter ili malpacon, kaj tuj forirante kvazaŭ nenio okazis. Ili ja estas vere ĝenigaj!

La kelo ŝajnas esti enloĝata de fantomoj! Oni povas nur aserti, ke tie ekzistas loĝanto, sed identigi lin ne estas facila afero. Kelkaj metapsikaj detektivoj diras, ke la loĝanto estas S-ro Astralo, aliaj lin nomas Perispirito. La dubo estas tiel granda, ke oni eĉ ne scias, ĉu estas li aŭ ŝi, ĉu viro ĉu virino, ĉu estas S-ro Spirito aŭ S-ino Animo. Estu ĝi iu ajn, tute ne gravas, ni nomu lin La Loĝanto de la Subteretaĝo!

Lia preferata amuzado ĉar li estas kontraŭmaterialisto, estas terurigi ceterajn membrojn de la familio, kiam venas la fataleco de la morto.

Loĝu ie ajn liaj parencoj, ĉu en la sama urbo, ĉu alilande, li, la mistera loĝanto de la kelo, eliras el la konstruaĵo kie li vivas kaj aperas tie malproksime, ne atendite kaj oni ne povas klarigi kiel, kial kaj por kio.

Tio estas tempopasigo egala al iu ajn alia. Oni diru, ke tio estas sensenca ŝerco, neridinda moko. Tamen el ĉiuj loĝantoj de la domo kiun la arkitektoj de la Psikologio nomas Homa Naturo la plej kurioza, pridiskutita kaj nekomprenebla estas, certe la stranga, originala kaj enigma Loĝanto de la Subteretaĝo!

Esperantigis Alberto Bonfim.

Jen, ni eldonadas kun granda streĉo la gazeton. Ĝi estas grava interligilo inter ne nur la AERJ-anoj, sed inter ili kaj la enlandaj esperantistoj, kaj inter ili kaj latutmonda E-movado.

* * *

La kunlaboro de ĉiuj urbaj esperantistoj, ĉiutendencaj kaj ĉiureligiaj, sub la verda standardo de A.E.R.J., estis grava sukceso por nia movado, ĉar la kunlaboro estas ĉiam necesa por plifortigi nian ankoraŭ malfortan movadon.

* * *

(Vortoj el la parolado de la Prezidanto de la Asocio, okaze de ĝia 6^a jardatreveno je la 30-3-1948)

Komerco, industrio, bankoj

Oni organizas nuntempe internacian Esperanto-entreprenon kiu celos praktikan enkondukon de nia kara helplingvo en ĉiujn komencajn, industriajn kaj bankajn mediojn.

Sendube, estas ja necesa la praktika uzado de Esperanto en la ĉiutagaj negocoj. Tamen, ni preskaŭ malesperas, kiam ni vidas la organizadon de tiom grava entrepreno, ĉar ni ja scias, ke la esperantistoj ĝenerale ne estas praktikaj, kiam temas pri ĉi tiu afero.

Ni ĉiuj perlaboras nian ĉiutagan panon, kaj ni ja kapablas, en nia privata vivo, havigi al ni la bezonatan monsumon por nia vivteno. Tamen, kiam la monakiro koncernas la Esperanto-movadon, tiam ni estas timemaj, revemaj kaj nedecidemaj.

Eĉ ŝajnas al ni, ke neniam la esperantistaro lernos bone apartigi la idealismon, la banalaĵojn kaj la praktikecon de nia movado. Kiam iu grava kaj serioza komerca firmo anoncas pri importado kaj eksportado, ĝi ricevas multajn leterojn de gejunuloj petantaj korespondadon kaj proponantaj interŝanĝon de poŝtmarkoj. Kiam iu aktiva esperantisto intencas fondi ion praktike progresigonta la movadon, al li alvenas nur la proponoj de revemaj kaj nepraktikaj homoj, kiuj ĉiam restas en lando de fantazioj, nekapablaj havigi al si grandan kapitalon por grandskala kaj psikologie efika enkonduko de Esperanto en ĉiutagan vivon.

Urgas, do, ke ni ĉiuj laboru kune por la starigo de granda entrepreno, kiu devos per ĉiuj rimedoj, kaj tute senpartie, sukcesi dum nova periodo de nia movado — en kiu Esperanto definitive venkos la mondon!

Verkis Ivan Markus.

MALGOJA FILOZOFIO

CARLOS DE LAET (1847 — 1927).

*Rozinjo vestas sin kaj, jen, amara,
mirinda voĉo el la vesti' eliras:
"Multegaj mortas ni", la voĉo diras,
"ke kovru vin la silka ŝtofo kara."*

*Kaj poste el kombilo la porhara,
l' esti' elefanta al Rozin' sopiras:
"Ke mi vin servu, mortis — ĉu vi miras? —
korpego mia en densej' arbara."*

*Kaj diras de l' kolringo perlo bela:
"Por kapti min, ha! kiom da parioj
en mar' pereis, en afliktaj sortoj!"*

*Kaj ploras la knabin': "Ha! fat' kruela!
Naskiĝas la ridet' el mil ve-krioj,
teksigas tuta vivo el mil mortoj!"*

* * *

*El la portugala lingvo esperantigis
Francisco V Lorenz.*

ZAMENHOF kaj ESPERANTO

Zamenhof estis la sola kreinto de la plej perfekta lingvo ĝis nun ekzistanta.

Tiu aserto estas sufiĉa, por ke oni diru ke li estis genia, ĉar la verko estas la prej bona atestanto de la kapablo de l' aŭtoro.

Sed Zamenhof ne nur kreis belsonan, facilan, riĉan kaj sencolan lingvon.

Tute ne: Li kreis lingvon kaj ankaŭ gravan celon por tiu lingvo.

La verko de Zamenhof estas genia kaj bela, sed ĝia plej granda beleco estas en la celo.

Se Esperanto ne havus celon pli altan ol la ceteraj, lingvoj mi ne fariĝus esperantisto, malgraŭ ĝia beleco, ĝia facileco kaj ĝia ankoraŭ malgranda utileco. Kiel mi, pensas preskaŭ duono de la esperantistoj. Kaj mi ripetas: la celo de Esperanto estas la plej genia Zamenhofa verko.

Nun estas necese klarigi, kiu estas tiu celo. Estas la tiel nomata interna ideo, kiu naskiĝis en la cerbo de Zamenhof antaŭ ol la unuaj pensoj pri Esperanto; tamen li ne volis altrudi tiun internan ideon al ĉiuj esperantistoj, ĉar li sciis, ke multaj personoj lernos Esperanton nur por praktikas celoj.

Esperanto, laŭ Zamenhofaj pensoj, celas la fratecon de l' homaro; Esperanto celas pacon, ĉar sen paco ĝia ekzistado estas nebla; kaj Esperanto havas aliajn celojn, kiujn mi ne rimarkigas, ĉar ili estas sennombraj kaj ŝatataj ne do ĉiuj.

Zamenhof! Hodiaŭ, tago, kiam oni vin honoras, mi ankaŭ parolas al vi, dankante nt nur Esperanton, simplan ilon, sed precipe ĝian celon, kiu igas nin preskaŭ adori vian verkon, preskaŭ apotcozi vin; tiun celon, kiu igas nin respondi tiel:

— Kiu estas via plej ŝatata lingvo?

— Esperanto!

— Kiu estas via ĉefa okupo?

— Estas la poresperanta, sinjoro.

— Kiu estas via religio? Kiaj viaj politikaj ideoj?

— Ho, sinjoro, mi estas esperantisto!

Dankon, Zamenhof!

Silla Charies.

Rakonto

— Rakontu belan historion...

Kaj la nepoj, ĉirkaŭante la maljunan avinon, atendas belajn, emociigajn kaj ĉarmajn fabelojn. Sed la avino kun dolĉa rideto diras:

— Hodiaŭ mi ne rakontos grandan nek emociigan fabelon. Mi rakontos al vi pri sceno kiu mi vidis hieraŭ; ĝi ĝojigis min kaj igis min ekpensi pri la infanoj kun iliaj puraj koroj kaj pensoj.

... Ce alta pordo de la lernejo la gelernantoj disiradis. Aroj da infanoj movis sin direktante al siaj hejmoj. Sed, ho, ili iris tre malrapide kun seriozaj mienoj: ili ne kuris kiel kutime kaj ilia rido malaperis... Mi staris mirigita. Io okazis! Kaj decidinte klarigi la aferon, mi vokis unu el la lernantoj:

— Psss, knabeto, kio okazis, ke vi estas malgajaj?

— Ha, sinjorino! La direktorino parolis al ni hodiaŭ pri milito, paco, pli bona mondo, frata amo kaj fine ŝi diris:

— Al vi apartenas la mondo kaj al vi ni ĝin konfidis; al vi ni transdonas la taskon aliformigi la mondon, alvenigi longedaŭran pacon per viaj koroj, liberrigitaj de la malamo...

La knabeto ĉesis paroli, faris malgajan mienon kaj demandis:

— Kiel ni povas fari tion? Diru! Kiamaniere ni, tre malgrandaj, povas labori por tio?

Kaj fine li aldonis:

— Jen kio maltrankviligas niajn korojn kaj pensojn!

Verkis S-anino Arlette Costa
de Souza.

Cortinas Americanas

VENEZIANAS
PARA JANELAS
PORTAS E
VARANDAS

Ornamentos
Gratis

TEL. 43-0026

RUA SACADURA CABRAL, 291



RICEVITAJ PUBLIKIGAJOJ

Unuope ricevitajn librojn kaj presaĵojn ni mencias, duope ricevitajn ni recenzas.

* * *

10-a Jubilea Kongreso de Flandra Ligo Esperantista. Antwerpen, 1939. Argente bindita, 98-paĝa lukse presita libro kun bildoj.

* * *

GANDHI. 30-paĝa broŝuro pri la vivo de Gandhi. Parolado de S-ro Venancio F. Neiva. Eldono de Clube Positivista.

* * *

O Espiritismo e os Problemas Humanos. Portugallingva, 219-paĝa normalformata libro. Verkis S-ro Deolindo Amorim. La libro estas dediĉata al RIO ESPERANTISTA.

* * *

DHARANA. 40-paĝa revuo portugallingva kun bildoj. Oficiala organo de Brazila Teozofia Societo.

* * *

33-a Universala Kongreso de Esperanto en Malmö. 1948. Bele presita broŝuro pri Svedujo kun bildoj kaj teksto en Esperanto.

* * *

Internacia Kulturo. Bulgaraĵo. Sofia. Belega esperanto-revuo kun bildoj. Aparte bonvenataj estas bildoj pri pentraĵoj kaj skulptaĵoj. La enhavo vidiĝas grandan rekonstruan klopodon de tiu popolo.

* * *

O ATENEU. 4-paĝa, portugallingva gaveto el Montijo. Portugalujo.

ANONCETOJ

MORITZ ALTMANN — Av. Pres. Wilson, 198, sl. 204, Rio de Janeiro — Importado de vitraĵoj, aluminaĵoj, k. s. Li interesiĝas pri Esperanto, sed ankoraŭ ne decidis lerni nek uzi la lingvon en sia komercado. Samideanoj el iu ajn lando sendu al li seriozajn proponojn pri vendo de la suprecititaj varoj por interesigi lin.

* * *

K. A. METZKES, Burggrafenstr. 52 (22a) M. Gladbach, Brita Zono, Germanujo, evoluis skrofolan kuracilon, precipe taŭgan por infanoj, suferantaj je maskita tuberkulozo, kaj sciigos senpage la recepton al ĉiuj homeopatiaj aŭ biologiaj kuracistoj en la tuta mondo.

LASTAJ NOVAĴOJ ESPERANTAĴOJ

Virina Esperanto-Asocio "Lidja Zamenhof", el Natal, okazigas kurson, kiu tre bone progresas, gvidata de F-ino Eunice Bezerra Santos.

* * *

La revuo A. A. B. B., bele ilustrita organo de "Associação Atlética Banco do Brasil", publikas ĉiumonate paĝon pri Esperanto. La sekción redaktas kaj prizorgas nia S-ano Nelson Pereira de Souza. La aprila numero enhavas artikolon de S-ano Delio Pereira de Souza pri Foiro de Lyon. Ĉiu esperantisto povas verki artikolon precipe pri bankaj kaj komercaj aferoj, sed ankaŭ pri literaturo, kaj povas sendi al la dirita S-ano, Av. Atlântica 1080, Rio de Janeiro.

* * *

S-ano Dragutin Wranka faris prezentparoladon pri Ĉe-metodo en la belega salono de Brazila Ligo Esperantista. Ĉeestis D-ro Carlos Domingues, prezidanto de la Ligo, kaj S-ro A. Caetano Coutinho, prezidanto de Brazila Klubo. Ankaŭ ĉeestis la Ĝenerala Sekretario kaj kelkaj samideanoj de nia Asocio. Je la fino de la parolado kaj provleciono S-ro Domingues varme gratulis S-ron Wranka, pro la bonega kaj interesplena prezentado de Ĉe-metodo.

* * *

Aperis "Amazonas Verda Stelo", nova unupaĝa multobligita bulteno de amazonaj samideanoj, portugallingve. Ni g atulas niajn entuziasmajn samideanojn.

SELOS POSTAIS

S-ano Paulo Ludka se propôs para organizar um serviço de catalogação de selos postais para a Associação vendê-los em benefício de sua caixa. Quem fará o maior donativo de selos do Correio à A.E.R.J.?

REKLAMOJ

Ĉu vi havas konaton industriistan aŭ komercistan, kiu espereble donos reklamon al la gazeto? Se jes, vi mem ĝin havigu, aŭ parolu pri tio al la administranto aŭ al la direktoro. Vi rajtas je 30% de la ravigitaj reklamoj. Helpu la daŭran vivadon de VIA GAZETO!

	CrP
Glumarko Zamenhof — cento	6,00
Glumarko Esperanto lingvo int. — cento	6,00
Glumarko Oni korespondas Esp. — cento	6,00
Glumarko Esperanto — steleto — cento	6,00
Leterkartoj — verda stelo k Esp. — cento	30,00
Leterkartoj — verda stelo k Esp. — kvindeko	20,00
Poŝtkartoj — verda stelo k Esp — samaj prezoj	
Poŝtkarto por kristanoj — A C M	1,00
Leterpapero kun verda stelo — cento	20,00
Kovertoj kun verda stelo — cento	20,00
Insignoj Esperanto	8,00
Insignoj verda stelo sur blanka fono	10,00
Memoriga folio pri la X Brazila Kongreso — por filatelistoj	10,00
Memoriga poŝtkarto pri la XI Brazila Kongreso — por filatelistoj	3,00
Mura ĉiamdaŭra kalendaro el ligno	40,00

La aliurbaj samideanoj ne bezonas sendi monon, ĉar ni sendas per la "Poŝta Repagservo". En nia libroservo estas ĉiuj Esperantolibroj.

FILATELISTA ALBUMO

Por komencantaj filatelistoj, ĝi estas la plej bona donaco al via filo. Kun regula kvanto de la poŝtmarkoj devite algluitaj.

Mendebla per "Reembolso Postal" al Giacomo Pavan — Caixa Postal 197 — Baurú — Estado de São Paulo BRAZILIO

NIAJ KULTURKUNVENOJ

Okazis kulturkunveno, la ŭ malnova kutimo, la L-an de majo, sabate, en nia ejo, je la kvara kaj duono sub la gvidado de S-ano Laszlo Zinner. Ĉeestis multaj gesamideanoj inkluzive S-ro Ismael Gomes Braga kiu plezurigis nin akceptinte nian inviton.

Malfermis la kunvenon S-ano Zinner kiu alparolis la ĉeestintojn pri la projekto de nova sistemo aplikota al niaj kulturkunvenoj. Li petis kapablajn samideanoj traduki pecojn el brazila literaturo aŭ verki pri brazila kulturo kaj arto kaj pri samspecaj interesaĵoj por ilin prezenti dum niaj kunvenoj kaj la plej taŭgajn presigi en nia oficiala organo RIO ESPERANTISTO. Tiamaniere, ni esperas, niaj kunvenoj atingos la celon starigitan de ni mem.

S-ano Ismael Gomes Braga parolis al la ĉeestintoj, laŭ sia kutimo, pri Esperanto, kuraĝigante la ĝejnulojn kaj pri la faktoj kiuj reliefigas altan signifon de nia movado. Sekve, S-ano Délio Pereira de Souza, nia prezidanto, prezentis novajn planojn por akceligo de nia poŝtperanta laborado.

Fine S-ano Laszlo Zinner laŭtleĝis verkon de S-ro Tivadar Toth, hungara esperantisto, kiun li ankaŭ laŭleĝis en 1939 antaŭ la mikrofono de la hungara radistacio "Danuba Voĉo", dum la programo titolita "Ciganmuziko kaj la hungaraj popolkantoj", afable sendita de D-ro Vincze Toth, direktoro de Esperanto Kulturservo en Budapeŝto.

La 8-an de majo S-ano Zinner parolis pri hungara popolarto kaj S-ano Délio Pereira de Souza laŭtleĝis el la bonega revuo "Literatura Mondo" rakonton de Jenő Heltai. S-ro Jozefo Cosenza ektuŝis ĝeneralajn aspektojn de la nuntempa movado.

Ni devas ĝoje konstati, ke niajn kunvenojn ĉeestas novaj esperantistoj kiuj diligente vizitas nin kaj klopodas perfektigi en Esperanto dank'al niaj esperantoparolataj kunvenoj.

A. J. VAZ

Corretor de seguros de vida e ramos elementares
RUA PARANA', 71
Tel. 29-6601

Tra La Mondo

BOLIVIO — Reaperis gesamideanoj Tibor Sekelj kaj Maria Reznik Sekelj, kiuj estis perdiĝintaj tra la arbaro en nordorienta Bolivio, kien ili vojaĝis por pristudi la vivo de la indigenoj. La citataj gesamideanoj estas tre bone konataj de brazila esperantistaro, ĉar ili partoprenis la X Brazilan Kongreson, kaj poste vojaĝis al ŝtatoj "Mato-Grosso" kaj "Goiás" por pristudi ties indigenojn, kaj sa-no Tibor Sekelj verkis hispanlingve libron pri ilia vivo. En Cochabamba nis samideano paroladis pri liaj vojaĝo kaj aventuroj.

* * *

GERMANUJO — La Germana Esperanto-Kongreso, dum Pentekosto, en urbo Munĥeno, estis grandioza kaj sukcesplena. Partoprenis 2.000 gesamideanoj, inkluzive centoj da eksterlandanoj. Tre grava kaj esperiga sukceso por la movado!

AFRIKA VOĈO

S-ano J. SEMMELINK, Morgenster Misio, Victoria, Suda Rodezio, Afriko, publikigas informilon kun sciigoj pri la afrika vivo kaj respondoj al siaj korespondantoj, inter tiuj al direktoro de RIO ESPERANTISTA. Ricevinte la nron. 8-1947 de nia gazeto, li tre ŝatis la fablon "En Simiolando", kaj tial li rekomendas ĝian legadon. Dankon al vi, Samideano.

INFORMILO

Portugala Esperanto-Ligo aperigis 6-paĝan multobligitan informilon kiu enhavas precipe la statistikon pri la nombro de la anoj de la Ligo (279), sciigojn pri libroj kaj biblioteko. Ĝi ankaŭ donas informojn pri la nomoj de unuaj Estroj de la Ligo: Prezidanto de ĝeneralaj kunvenoj — s-ano Julio Cesar Pereira; Prezidanto de la Kontrolokmitato — s-ano Vitor Hugo Homem; Prezidanto de la Direkcio — s-ano Armando Gomez Cunha.

VIENA GAZETO

4-PAGA GRANDFORMATA GAZETO EL AŬSTRIO
Abone ĝin pere de nia redakcejo:
POSTKESTO 3677 — RIO DE JANEIRO
Abonprezo: Cr\$ 30,00

ABONO DE GAZETOJ

La anoj de la Asocio kaj la abonantoj de R. E. povas aboni revuojn kaj gazetojn pere de nia administrejo. La monon ni transdonos al perantoj de la abonitaĵoj. Malsendo devas veni je la nomo de la administranto de la gazeto aŭ de la kasisto de la Asocio.

SAMIDEANOJ:

En la ejo de la Asocio vi povas legi multajn Esperanto-gazetojn kaj revuojn. Venu ofte post la 6^a. horo vespere, sabate post la 2^a.

SUBTENANTOJ

Dum la monato Majo la gazeto ricevis monan subtenon de la jenaj samideanoj, al kiuj ni elkore dankas: Paulo O. Ludka, S-ino Cedilha Neto, D-ro Braz Cosenza, L. Zinner, F-ino Elza T. Faria, J. Barbosa, F-ino Rosa Lifchtz, José Cosenza, Nelson de Souza, Othon C. Nunes, kaj D. Pereira de Souza.

Esperanto Kaj Rotarianoj

La ĵus pasintan monaton brazila ĉefurbo gastigis kelkajn centojn da rotarianoj okaze de la 39.^a kunveno de tiu tiel nomata "internacia organizaĵo". La okazintaĵo donis al ni ŝancon pli unu fojon observi, noti kaj registri la urĝan bezonon enkonduki nian lingvon en internaciajn interrilatojn.

Tiu, kiu observis la anojn de la menciita organizaĵo (tasko tre facila, ĉar ĉiu el ili portadis sur la brusto ŝildeton kun sinacia flago) tuj povis konstati, ke la ĉefaj lingvoj parolataj de ili estis angla, hispana kaj portugala kaj ke tiuj, kiuj parolis la lingvon anglan preskaŭ neniam komprenis tiujn kies lingvo estis hispana aŭ portugala kaj, ke ĉi tiuj, lastaj, multfoje ankaŭ ne komprenis la anglan lingvon sen menci la alilandanojn kiel francoj, nederlandanoj, belgoj k.a. kiuj ne estis devigataj scii nek paroli la tri lingvojn de Ameriko.

Ĉar ni vidis kaj konstatis persone, ke la anoj de tiu organizaĵo ne klopodis nek zorgis (aŭ eble tute ne deziris) eĉ saluti unu la alian sur la stratoj kie ili hazarde renkontiĝadis, ni ne estas inklinaj kredi, ke ili iam povos starigi veran internacian kunlaboradon en iu ajn sfero antaŭ ol ili enkonduku Esperanton kaj, kio estas pli grava, ekpenetriĝu per la interna ideo de esperantismo.

Aparte de la fakto, ke la anoj de tiu organizaĵo estas grandparte personoj apartenantaj al la riĉaj klasoj kiuj povas malŝpari monon kaj tempon en sencelaj vojaĝoj de unu lando al alia, estas ankaŭ la fakto ke, malgraŭ brua fanfaronado, la organizaĵo ĝis nun preskaŭ nenion utilan, al la vidpunkto praktika kaj internacia, realigis.

Al tiu, kiu proprokule vidis kaj notis la mankon de la homaranismo ĉe la rotarianoj malantaŭ la brila kaj pompa eksterajo, la kialo estas klara kiel akvo — al la rotarianoj mankas "io, kio abunde troviĝas ĉe la esperantistoj", tio estas, la Interna Ideo. Dum ili ĝin ne posedas, la organizaĵo restos tia kia ĝi estis ĝis la hodiaŭa tago — internacia turistiklubo kaj meĥio plu.

Tamen, de nia flanko, ni devas, bedaŭrinde, agnoski, ke la gvidanta ĉefa kaj oficiala organizaĵo de nia movado en la lando, kiu posedas kelke da rimedoj, forperdis kaj ne volis profiti tre oportunan okazon fari bonan, utilan kaj efikan propagandon poresperantan dum la 39.^a kunveno de la rotarianoj. Vere diras la proverbo, ke "hejma sankulo miraklojn ne faras".

Junio, 1948.

Kobo.

COPEGIO BRASIL

Diretor: Prof. J. J. TRINDADE FILHO

Cursos primário e ginásial — Diurno e noturno
RUA ASSIS CARNEIRO N.º 576
PIEDADE — RIO DE JANEIRO

A. S. REZENDE

— Inĝeniero —

projektoj kaj antaŭkalkuloj por loĝdomoj
luksaj, hoteloj, hospitaloj, lernejoj, kaj
aliaj konstruaĵoj.

Informpetoj en lingvoj portugala, franca,
angla kaj Esperanta

Adreso: Caixa Postal 2917

Rio de Janeiro

Brazilo

DEZIRAS KORESPONDI

LÁSZLÓ FANCSALY, Budapest XI, Verpeléti utca 26.1.3, Hungarujo — 20-jara universitata, kun la tuta mondo.

* * *

STEFAN WABRA, (20b) Polle/Obersveser, Brinkster. 141, Germanujo, Brita Zono — 42-jara, katolika kaj edzigitaj, deziras korespondi kun la iamaj amikoj kaj novaj, pri komerco, politiko, literaturo kaj interŝanĝi il. pk.

* * *

HANS WOLPERS, 24/Hamburg-Farmsen, Wieselweg 5, Germanujo — pri arto, scienco kaj muziko.

* * *

WILLY EXNER, Restoracio "Kaiserlinde", Neuenkirchen, Greipwald, Germanujo — pri ekonomio kaj industrio.

* * *

FRANZ KNOBLOCH, Munchberg-Ofr., Karlstrasse 71, US-Zono, Germanujo — deziras korespondi kun kelkaj landoj. Li estas prezidanto de loka E-Grupo.

* * *

ANTANAS RAMANAUSKAS, IRO-Baltic Camp, Jager Caserne, Block 14, Garmisch-Parkirchen, Ober Bayern, US-Zono, Germanujo — Latva S-ano, eksprezidanto de Kuanas Esperanto-Asocio. Deziras ricevi esperantaĵoj kaj korespondadi pri ĉiuj temoj.

* * *

TERMES SANDOS, Budapest IX, Vendel u 34, F. I., Hungarujo — 19-jara laboristo, kun samaĝa esperantist(in)o.

* * *

VAGO LMRE, Pecs, Bartfao-u-5, Hungarujo — Instruisto, pri literaturo, muziko kaj abeloj.

* * *

MOYSÉS GARCIA SOBRIÑO, Rua Frei Caneca, 972, São Paulo, Brazilo — kun karioka samidean(in)o.

* * *

LUIZ BARTHOLOMEU, Caixa Postal 2, Baurú, São Paulo, Brazilo — Deziras korespondadi kaj interŝanĝi poŝmarkojn el la tuta mondo. Reprezentanto de RIO ESPERANTISTA.

FRANCUJO. — S-ro Rene Pazols, kun instruistino profesia pri literaturo, arto kaj aliaj temoj. 4 rue Fonder, Marseille. Boucher du Rhone.

AOS ESPERANTISTAS CARIOCAS

Dia a dia mais difícil se torna o regresso aos lares dos que exercem as suas atividades no centro da cidade. O cidadão tem de permanecer por mais de uma hora nas filas de ônibus; ou se amontôa nas estações das estradas de ferro a espera de um comboio ou ainda, os mais pacatos, viajam de bonde, mas gastam um tempo enorme numa viagem cansativa e enfadonha. Depois das 19 horas, porém, começa a se escoar a multidão humana e já às 20 horas é fácil encontrar lugar em qualquer veículo. Atualmente já é grande o número dos que não seguem imediatamente para casa, após deixar o seu trabalho: vão a um cinema, ao seu clube, etc.

Os esperantistas cariocas poderão se acostumar a visitar a sua Associação, diariamente ou três vezes por semana. Poderão se entender com um dos diretores da A.E.R.J. para a realização de cursos elementares e de aperfeiçoamento à tardinha, de 17 às 18 horas, ou das 18 às 19 horas.

Assim, teremos um movimento mais vigoroso e cada um, em particular, lucrará, porque se aperfeiçoará mais rapidamente no conhecimento da língua universal.

Os que não preferirem realizar cursos, poderão se dedicar a leitura de obras da sossa Bibliotéca e das gazetas mais recentes, recebidas de todo o mundo. Por motivo do envio de RIO ESPERANTISTA a todos os clubes e gazetas esperantistas, estamos recebendo todas as publicações que se editam atualmente, bem como cartões-postais com pedidos de correspondentes.

GERMANUJO. — S-ro Max Hocke, pri ĉiuj temoj generalaj. Edlingerstrass 3/1. Munchen, 9. U.S.A. - zono. Bavario.

USONO. — S-ro Donald Bushaw, pri interŝanĝo de libroj kaj poŝmarkoj, studentaj aferoj. 1802 C. Street, Pullman. Washington.

PORTUGALA ELDONA RONDO

Ni farigis reprezentantoj de tiu eldonejo. De nun niaj samideanoj povas mendi ĉe ni la librojn de P.E.R.

Vivo de Zola — Cr\$ 15,00
Enkonduko en la Kulturon: kolekto de popularsciencaj kajeroj — abono Cr\$ 15,00.

La mensendo povas veni en la nomo de nia administranto, aŭ de la kasisto de la Asocio. Ni ankaŭ sendas per la "Poŝta Repagoservo".

NOVOS SÓCIOS

O quadro de associados da Associação Esperantista, de janeiro a junho do corrente ano, foi acrescido dos nomes seguintes: — Paulo de Oliveira Ludka, Zeus Wantuil, Candido Max de Oliveira, Paulino José de Carvalho. Porfírio Moraes Pinheiro, Adinar Antunes Pinheiro, Michel Ferraz Saad, João Germano Abreu, Stela Pessoa Silva Oliveira, Afonso Vieira, Daisy Leal Paixão Lucas, Hilso de Souza, Alfeu Couto, José Gomes Cavaco, Paulo Olivier, Oswaldo Rodrigues, Eugênio Souza Nascimento e Milton Cesar dos Santos.

CARIOCA

Dai o vosso apóio à Associação Esperantista do Rio de Janeiro, tornando-vos um de seus membros ou propondo um novo associado.

ESPERANTA MURKALENDARO

Ĉiamdaŭra, luksa, el bona ligno kaj kartono, laŭ la formato 30 x 20 centimetroj. — Prezo: Cr\$ 40,00.

Mendoj al ASSOCIAÇÃO ESPERANTISTA DO RIO DE JANEIRO, Caixa Postal 3677, Rio de Janeiro, Brazilo.

RIO ESPERANTISTA
Propriedade da A.E.R.J.
Um jornal do Rio para o mundo

Diretor responsável
Delio Pereira de Souza

Gerente
Wilton Ribeiro
Redator-chefe
László Zinner

Redatores
Konstanteno Blascikov
D-ro Braz Cosenza

EXPEDIENTE:

As importâncias referentes às assinaturas de RIO ESPERANTISTA, deverão vir em nome do nosso gerente, sr. Wilton Ribeiro, bem como quaisquer quantias, vales-postais, cheques, etc.

La gazeto rajtigas tutan liberon al ĝiaj kunlaborantoj kaj ĝi ne respondecas pro la enmetitaj konceptoj en artikoloj subskribitaj.

Estas permesata la represo de la artikoloj, ĉu parte, ĉu tute — kondiĉe, ke oni citu la fonton.

AMERIKOJ KONTORO

S-ROJ GOMES & PAVAO
Deziras reprezenti Komercajn kaj Industriaĵajn firmojn de via lando.

Adreso: — Rua 1.º de Agosto n.º 6-46 — Cambroj 3 kaj 7
Poŝtkesto 124 — Baurú — Stato São Paulo
BRAZILIO
Korespondas en Portugala kaj Esperanta lingvoj.

EL LA "URBO DE LA ROZOJ"

Ŝtato Oregon kiu estas unu el la tri verdaj Pacifik-marbordaj ŝtatoj de Usono, estas festanta sian jubilean centjaron dum 1948, memorigante finon de plencentjaro de progreso kaj evoluon el profunda sovaĝejo de la malproksima okcidento.

Antaŭ ol oni eltrovis la oron en ŝtato Kalifornio, la Oregon-lando, kiu tiuepoke entenis la ŝtatojn Idaho, Washington, Woyming kaj okcidentan parton de la ŝtato Montana, estis la fokusa loko de la pioniroj.

Okazintaĵoj kiuj antaŭigis la starigon de la Oregon-teritorio en 1848 malfaldas kvazaŭ vidindaĵoj el la granda historia kinematografaĵo. Unue venis la esploristoj, poste venis la epoko de la felintersargistoj. Baldaŭ alvenis la misiistoj kaj fine aperis la karavanoj kiuj alportis la koloniistojn kaj la hejmajn ilojn por la domoj konstruotaj. Komprenoble, la Nacia Kongreso ne suspektis en tiu tempo kian riĉan teritorion Usono havigadis al si.

Preskaŭ ĉiu komunumo tra la ŝtato, de junio ĝis septembro, okazigas lacentjar-jubileajn festojn. Sed la plej granda festo estas en Portland kie, dum unu semajno en junio, la jam de longe mondkonata festo de la rozoj (Portland Rose Festival) okazas ĉiujare.

Rozoj kreskas kaj floras ĉie en la urbo, kaj ĉi tie, en Portland, troviĝas la Internacia Rozprovada Ĝardeno. La altlernejoj de la urbo elektas belan junulinon el ilia nombro kaj ŝi, kune kun ok aliaj fraŭlinoj, kiuj estas princinoj ĉe la kortego de la rozo-reĝino, regas dum la rozsemajno. Komprenoble, la urbanoj estas humilaj regat-

oj kaj pagas al la rozo-reĝino sian respektigon.

La plej granda spektaklo estas grandioza rozparado dum kiu onipovas vidi pli ol kvindek veturilojn surkovritajn de floroj kiuj majeste moviĝas tra la urba stratoj en kiuj la regatoj de la roz-regno amasiĝas ambaŭflanke.

En tiu belega mondparto ankaŭ evoluas Esperantomovado. Kvankam nuntempe ne estas multe da esperantistoj, ni havas grandajn esperojn pri la estonteco. Jam la Portland-klubo okazigis la unuan letervesperon dum la pasinta marto. Ĉirkaŭ ducent leteroj kaj poŝtkartoj, kune kun diversaj Esperanto-propagandaĵoj, alvenis el dek-ok landoj. Komprenoble, estas sufiĉe da laboro respondi al ĉiu sendinto, tamen estas ja granda ĝojo.

Nuntempe du nemultnombraj kursoj estas gvidataj por perfektigi kelkajn, kiuj, espereble, povos instrui en estontaj kursoj.

Vere, nordokcidenta Usono estas paradiza ĝardeno kaj ideala regiono en kiu oni povas antaŭenigi la belan lingvon Esperanto.

Sciigas S-ino Cecelia
P. Thomas.

A D R E S S A N G O

Dum kelkaj monatoj la adreso de S-ano Laszlo Zinner estas la jena: São Paulo. Ŝtato S. Paulo.
Caixa Postal 5888 — Brazilo

F A R I G U
S U B T E N A N T O
D E
"RIO ESPERANTISTA"

Pri "Volapük"

La antikva greka kaj latina lingvoj estas konsiderataj kiel la lingvoj naturaj estingiĝintaj. Same oni povas juĝi Volapükon kiel tia inter la lingvoj artefaritaj. Esperanto, kiu ĝin venkis, estas nun sur la certa vojo gajni la premion. Ĉiuj aliaj konkurantoj, inkluzive la plej nova "Basic English", ne povas modifi plu la situacion.

Per tio, kion ni diris, ni absolute ne volas kaj eĉ ne povas malgrandigi la imponan meriton de prelado J. M. Schleyer. Estis li kiu en la jaro 1879 elpensis la unuan taŭgan, artefaritan lingvon por la internacia interkompreniĝo, nomita Volapük. Se, post pli ol jardeko da supermezuraj sukcesoj, ĝi tamen devis cedi, tiu nur okazis pro tio, ke oni ege kontraŭbatalis la proponojn gravajn malperfektaĵojn ankoraŭ en ĝi ekzistintaj.

La Volapük-movado sukcesis efektiviĝi tri kongresojn internaciajn, estis jam disvastigita en la komerco, posedis pli ol 300 grupojn aŭ unuigojn kiuj zorgis pri la studado kaj la propagandado de la lingvo en la kvin mondpartoj, havis aron da revuoj kaj bonan komencon en literaturaj verkoj originalaj kaj tradukitaj.

Fakte, Volapük ankoraŭ ĝis nun ne malaperis komplete. La nuna anstataŭanto de prelado Schleyer estas

D-ro Albert Sleumer. Dum la jaroj de la necerteco okaze de la unua mondmilito la volapüka Centra Oficejo estis en Svisujo kja nun en Nederlando. En tiu lando aperas ankaŭ volapüka gazeto. Ekzistas eĉ volapüka unuigo ĉar oni, ja pro pieco, ne volas, ke la memoro pri prelado Schleyer malaperu.

En Brazilo Volapük havis kelkan disvastiĝon, precipe en la sudo de la lando. Ni posedas ankaŭ malgrandan Volapük-biblioetkon kiu estas en la manoj de la aŭtoro de ĉi tiuj linioj, kiu serĉas ĉiam pligrandigi ĝin. D-ro. Sleumer mem promesis helpi kompletigi ĝin kiel eble plej baldaŭ la poŝtaj malfacilaĵoj.

Resuma biografio pri prelado Schleyer kun skizo pri la Volapük-movado en ŝtato Santa Catarina aperis en la pasintjara januara numero de la revuo "Atualidades". Kiu ĝin deziras, bonvolu skribi al la redakcio (Florianopolis. Avenida Mauro Ramos, 301). Alia manuskripto, eble baldaŭ aperonta, pritraktas la movadon en tuta Brazilo.

Tiuj, kiuj sin interesas pri la afero, povas peti informojn de la aŭtoro.

Francisco S. G. Schaden
(São Bonifácio, Correio de Queçba, Ŝtato Santa Catarina — Brazilo.

EMPRESA "EUZE"

AV. PRES. VARGAS, 852 — TEL. 43-8495

Materiais para desenho e papelaria em geral

Trabalhos tipográficos

Artefatos de couro

REPRESENTAÇÕES E CONTA PRÓPRIA

PALACE MÓVEIS

Exposição permanente de Móveis de fino gosto

P. M. RAWET & CIA. LTDA.

Pc. das Nações 184 — R. Cardoso de Moraes 506-A

Bonsucesso RIO DE JANEIRO Ramos

DR. ADOLPHO STAERKE
Livre docente da Universidade do Brasil
Clínica de senhoras

Residência:

RUA BELA S. LUIZ, 68

Tel. 48-5892

Consultório:

R. ASSEMBLEIA, 58-1.

Tel. 42-3835

Rio Esperantista

Orgão oficial da A. E. R. J.

PENSAMENTO E TRABALHO PELA FRATERNIDADE UNIVERSAL

Diretor: Delio Pereira de Souza

Redator-Chefe: László Zinner

Assinaturas:

Brasil — Cr\$ 20,00
Exterior — U\$ 1,50
Ou 15 Coupões-resposta
Avulso — Cr\$ 2,00

Rio de Janeiro, Junho de 1948

ANO II — Edição mensal — N.º 15

Enderço: Caixa Postal 3677

Redação e administração
Rua das Marrecas, 19 2.º and
Telefone 22-5300

Libertempoj

Verdstelulo.

Dum la festo memoriganta naskigdaton de Zamenhof, okazigita de A.E.R.J., nia samideano D-ro L. de Azeredo Coutinho, prezidanto de Esperanto-Klubo, en Belo Horizonte, proponis utilan sugeston. Proponis li, ke ĉiu esperantisto klopodu pasigis libertempon en alia urbo kaj helpi, tiamaniere, la tian movadon. Tiu propono ŝajnas al ni tre interesa afero por la enlanda propagando de nia lingvo. Tamen, la plimulto de esperantistoj estas malriĉaj kaj ne povas pasigi libertempon eksterurbe. Tial ni pripensis la aferon kaj fine trovis la solvon por ĝi. Samideanoj proponu al la libertempantaj gastigadon en siaj hejmoj; pro tio la libertempantoj havos elspezojn nur por la veturado, kaj la gastigantoj por la gastigado. Reciproke, la gastoj poste gastigos la gastigantojn.

Tiuj, kiuj konsentas pri la ideo tuj skribu al la proksimaj kluboj aŭ al izolitaj samideanoj proponante ĝin, kio sendube plivigliĝos nian movadon. Esperantistoj loĝantaj en Rio ne povas veturi tra nia tuta lando, dume ni repre bezonas plivigliĝi la regionajn movadojn. La gvidantoj de Esp.-kluboj en ŝtataj ĉefurboj devas, do, veturi tra tuta regiono por okazigi prelegojn, propagandi kaj fondi grupojn de novaj lernantoj de internacia lingvo.

A UNIÃO FAZ A FÔRÇA

O movimento esperantista tem progredido bastante nos últimos tempos, na Capital da República. Novos esperantistas chegam cheios de entusiasmo e disposição para o trabalho árduo, cujos frutos só muito tarde aparecem; alguns mais antigos, que não estavam em atividade, retomam o seu caminho e colaboram de diferentes modos para o êxito da nossa campanha. Todos sentem que o trabalho vai se tornando mais suave e mais produtivo, porque o número de trabalhadores é maior e porque cada um já tem maior experiência e, conseqüentemente, age com mais sabedoria. Tudo isto registamos com imenso prazer e nós sentimos mais dispostos para continuar o nosso trabalho.

Porém... Tudo tem o seu porém. O homem é um ser pensante e pelo seu intelecto se sente como que um ser aparte de toda a criação. Por isto, todo homem quer realizar o que pensa, quer pôr em prática as suas idéias e não as de outrem. Tudo muito lógico e muito natural. Tais samideanos só merecem os nossos aplausos e a nossa cola-

boração. Não n'os merecem os que pensam e não agem, os que vivem a dar idéias aos dirigentes do movimento para que estes as ponham em prática.

Entretanto, ultimamente temos notado, justamente porque as nossas fileiras vão se engrossando, um forte sentimento divisionista. Então, é preciso estarmos atentos para que esta divisão não nos divida realmente. Cada um tem plena liberdade de compreender as coisas a seu modo, e de agir de acôrdo com esta compreensão, mas cada um deve ter sempre em vista a unidade do nosso movimento. Nós todos visamos o mesmo fim, nós todos desejamos a mesma coisa: a introdução do Esperanto na vida prática. Portanto, é preciso que haja estreita cooperação entre todos nós. Antes de agirmos devemos submeter as nossas idéias aos nossos companheiros. Não porque possamos estar errados. As nossas idéias sempre estão certas para nós próprios, porque são formadas em harmonia com o nosso ponto de vista e o nosso grau de compreensão das coisas. Precisamos submetê-las aos nos-

so colaboradores para que, cada um estude-a do seu ponto de vista pessoal, a fim de podermos deliberar sobre a conveniência e oportunidade de pô-la em prática e, em caso afirmativo, resolvermos sobre a forma de sua execução.

Sim, caros amideanos, nós vivemos no mundo das formas e precisamos ter cuidado sobre as formas que damos às nossas idéias. Uma idéia muito nobre e muito avançada, se não for apresentada ao mundo como de-

ve ser, não será aceita. Temos, pois, de conformar as nossas idéias ao mundo atual.

Unamo-nos, pois, em tôrno da Associação Esperantista do Rio de Janeiro. Unamo-nos em tôrno da sua bandeira. Cada associado tem pleno direito de expôr os seus pontos de vista. Reunindo-se a onze outros, podem convocar uma assembleia. A Associação existe para servir. O seu objetivo é colaborar para o progresso do Esperantismo e servir aos seus membros, por todos os meios. Cada associado é uma partícula dela e pode realizar as suas idéias dentro do quadro da Associação, harmonizando-as com o seu programa e com a colaboração dos demais companheiros. Não deve, porém, exigir que a diretoria ponha em prática as suas idéias pessoais. Por que? O motivo é simples. Esta já tem muitas idéias para realizar, cujas idéias são debatidas em suas reuniões e só são postas em execução em momento oportuno, quando se pode contar com o apóio de uma parte, pelo menos, do quadro social.

Não dispersemos esforços. Não nos cansemos inutilmente, ou com escasso proveito para o movimento. Mas, pelo contrário, unamos os nossos esforços, num nutirão único, a fim de alcançarmos o resultado mais rapidamente. A A.E.R.J. será o nosso ponto de concentração, o nosso ponto de apóio. Para tal ela existe, para tanto ela está preparada.

Cada um agindo individualmente, mas todos agindo em conjunto, como um só todo!

BRAZILA KLUBO "ESPERANTO"

La 29an de tiu monato Brazila Klubo "Esperanto" fariĝas 42-jara. Ĝi estas veterana klubo en nia movado, kaj multon ĝi jam faris por ĝi. En ĝia kadro estas ĉiuj veteranoj de Rio de Janeiro, al kiuj ni ŝuldas la subtenon de nia afero tra malfavoraj tempoj, kia estis, ekzemple, la postunuamilita epoko.

La unua Prezidanto de la Klubo estis S-ro E. Backeuser, kaj la nuna estas S-ro A. Caetano Coutinho, tre klera kaj fervora samideano. Li tradukis unue verkajojn de brazilaj verkistoj: "La Miozoto", de Rosalia Sandoval; "La Sortdirantolino", de Coelho Neto; "Tri Blindulinoj", de Maria Clara da Cunha Santos, kaj aliaj.

Al Brazila Klubo ni deziras progreson kaj grandan sukceson.